

Johann Wolfgang von Goethe, Roz' sur erikejo	Johann Wolfgang von Goethe, Heidenröslein	Johann Wolfgang von Goethe, Dornrozeto	Johann Wolfgang von Goethe, Knab' rozeton vidis li
<i>tradukita de Konrad Matheus</i>		<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	<i>tradukita de Joachim Gießner</i>
Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al juna ŝos' admiri ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Sah ein Knab ein Röslein stehn, Röslein auf der Heiden, War so jung und mor- genschön, Lief er schnell, es nah zu sehn, Sah's mit vielen Freuden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Vidis knab': Jen, ju- na flor'! Rozujet' kampara! Bela, kiel la aŭror'! Li alkuris ĝoje por Vidi, kiel kara! Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Knab' rozeton vidis li; erikeja floro. Juna, bela estis ĝi. Por admiri kuris li ĝoje kun adoro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.
Diris knab': "Mi rom- pos vin, rozo sur erikejo." Diris roz': "Dorn' pi- kos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Knabe sprach: „Ich bre- che dich, Röslein auf der Heiden!“ Röslein sprach: „Ich ste- che dich, Dass du ewig denkst an mich, Und ich will's nicht lei- den.“ Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Diris knab': Mi volas vin, Rozujet' kampara. Diris roz': Mi boras vin, Ĉiam vi memoras min, Pro l' dolor' amara. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Diris knab': „Mi rom- pos vin, vi rozeta floro“. Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min, premas min doloro.“ Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.
Kaj knab' sovaĝa rompis ĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj aĥ' ne hel- pis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Und der wilde Knabe brach 's Röslein auf der Heiden; Röslein wehrte sich und stach, Half ihm doch kein Weh und Ach, Musst es eben leiden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Knabo rozon ŝiris do De l' rozuj' kampara, Ĝi, defende, pikis tro! Sed ne helpis ve kaj ho Kontraŭ vol' barba- ra. Rozo, rozo, ruĝa roz', Rozujet' kampara.	Knab' sovaĝa romp- is ĝin; erikeja floro. Rozo ja defendis sin kaj suferis pikis lin, ne utilis ploro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.
...

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>.

Melodioj estas aŭdeblaŭ en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>.

La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 - †1976).

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kantotraduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.